

NiaBulteno

ISSN:0871-9241

JANEIRO-MARÇO 2005 JANUARO-MARTO • Numero 87

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-7/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217141359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt

Asembleo atentas homojn kaj ciferojn



KASESA

En kunveno markita per intensa rekalkulado de totaloj elektiĝis la gvid-organoj por 2005-2007 kaj aprobiĝis kotizplikostigo. Notindas rea kresko de la ĉeesantaro.

pĝ.3-4



FABIEN TSCHUDY

Eksterlanda gast-instruisto en Oporto

Fabien Tschudy venis por studi sian Bioteknologion sed oni jam lin engaĝis je instruado al komencantoj...

pĝ.3



PRIMO DIAS

“Silvja”: edziniĝo en esperanto

Silvia Faria de Bastos, nia movada “reĝidino”, edziniĝis lastaŭguste, kun esperanto en la nuptifesta invito!

pĝ.10

I.S.2004/05,
Wetzlar:

«Idee senti sin hejme»

Sep jarojn post la lasta portugala partopreno, jen la mitan I.S.n ĉeestas Rut' kaj Xana. Raporton & intervuon sur

pĝ.7-9

Katalunoj arigas 70-on!

Planita kiel rutina aranĝo por aktivigi komencantojn, la marta renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Junularo, en Mataró, estis finfine ĉeestata de pli ol 70 esperantistoj, inkl. de ses portugaloj. Bonan organizadon, firman lingvonivelon, kaj plafonfalan amuzon!

António Serafim Dias: 1920-2004 (pĝ.11)

Nia Bulteno (informa bulteno de
Portugala Esperanto-Asocio)
Numero 87 (jan.-mar. 2005)

ISSN:0871-9241

Redaktis:

António MARTINS-Tuválkin
Reviziis: Werther SACRAMENTO
Eldonkanto: 360 ekzempleroj
Abono (4 n-roj, nur ekster PT):
8-ono de landa MA de UEA
Unuopa ekz. (84-87): 5,00 €
(aliajn n-rojn laŭpete)
PDF-e havebla el http://www.esperanto.web.pt/nb_jxusa.html
Limdato por NB88: 2005.05.15
Finkompostita en: 2005.03.24



Portugala
Esperanto-
Asocio
Associação
Portuguesa de
Esperanto

(*peessoa colectiva de utilidade pública*)

☉ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359 ☉
☎ +351 217 933 924
✉ info@esperanto.web.pt aŭ
portugala@esperanto.web.pt
🌐 <http://www.esperanto.web.pt/>

CAE: 91331 **NIF:** 501 547 312
Fondita en 1972.04.25
Landasocio de U.E.A. ekde 1979
K-ano A: Faria de BASTOS
Membroj: 130(+47) en 2005.03.19
Monata kotizo: 1,50 €
(emeritaj kaj sub-18-jaruloj:
1,00 €; malriĉuloj: 0,00 €)
Aniĝkotiĉo: 2,50 €
Pagojn al: (IBAN: PT50...=) NIB:
0035 064 000 025 961 430 49

GVIDORGANOJ: (ekde 2005.03.19)

Ĝeneral-Asemblea Stabo:
Prezidanto: Faria de BASTOS
Sekretarioj: Manuel RUAS
Werther SACRAMENTO

Estraro:

Prezidanto: José MARTINS
Vicprezidanto: MARTINS-Tuválkin
Sekretario: Alcino ALVES
Kasisto: Miguel BOIEIRO
Voĉdonantoj: Alexandra G. e Paz
Wilson BRÍGIDO
Hugo LOURENÇO

Kontrol-Komitato:

Prezidanto: A. da Silva ALMEIDA
Revizoroj: Vítor MARQUES
Francisco MELO

Iĝantajn ŝanĝojn en nia landa movado vikle atestas ĉi numero de nia bulteno: Junuloj abunde kaj eĉ cêfrole, flue esperantlingve kaj tute aŭtonome — frapa kontrasto kun ĵusa pasinto! Kiu asertadas ke en nia movado **mankas la junaj fortoj**, ke troas la (eternaj) komencantoj, la “trudvarbitoj” kaj la fuŝuloj, tiu foliumu ĉiantaŭen kaj ĝoju malpravi! (Jen nepra evoluo: ja la Naturo apenaŭ hezitas forporti la veteranojn — ankaŭ pri tio ĉinumere...) Simile, oni ofte plende asertas ke nia movado estas tro “landa”, kun tre **malmultaj internaciaj kontaktoj**. Kvankam tio estis iam tiel, tiu tempo tamen estas definitive for — same pri tio legeblas en la postaj paĝoj: Internaciajn aranĝojn, senperajn kontaktojn, ekloĝojn eksterlande. Jen ĉio kvazaŭ nova en la portugala Esperantio. **Red.**

NEBALOTITAJ POSTENOJ:

Instruado: (vakas)
Libro-Servo: Silva ALMEIDA
Biblioteko: Werther SACRAMENTO
(periodaĵoj) Wilson BRÍGIDO
(eltondaĵoj) MARTINS-Tuválkin
(sonregistroj) Carlos MOREIRA
(diversaĵoj) (vakas)
Fotarkivo: Olga ALMEIDA
Subvencio: (vakas)
Gazetaro: (vakas)
Ret- kaj komput-aferoj:
Nuno MAGALHÃES
A. MARTINS-Tuválkin
Luís OLIVEIRA
Sidejmastrumo: Pedrosa ALVES

HONORAJ MEMBROJ:

António da Silva ALMEIDA
Alsácia Fontes MACHADO ☽
Manuel de FREITAS ☽
Alberto Pedro da SILVA ☽
Adelino Franco SIMÕES ☽
Manuel de Sousa TEIXEIRA ☽

LOKAJ SEKCIJOJ:

PLUS — Portugala Loka Unua Sekcio (nordokcidenta sekcio)
Repr.: Nuno MAGALHÃES
Fond.: 2002 **Membr.:** 22(+2)
✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ªA
PT-4150-589 PORTO
☎ +351 917 721 868
✉ plusanoj@clix.pt
🌐 <http://www.esperanto.web.pt/plus.htm>

JUNULARA SEKCIO:

Portugala Esperanto-Junularo
Jovens Esperantistas de Portugal
Fond.: 1993 **Membr.:** 14(+16)
(L.S. de TEJO ekde 1996)
🌐 <http://www.esperanto.web.pt/pej.htm>
✉ pej@esperanto.web.pt
☉✉📠: ĉe P.E.A.

ALIAJ ORGANIZOJ:

Nogeso — Norda Grupo de Esperanto-Studado
☉ kafejo *Estrela d'Ouro*; str. *Fábrica*; Oporto (antaŭaverton!)
✉ esperanto@mail.pt
🌐 <http://www.nogeso.cjb.net/>
☉✉📠: ĉe PLUS
Saluton! — Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza
☉ 2-an dim. ĉ.m. 15:00; Cacém
✉ Avenida Bissaia Barreto, 2
PT-3360-191 PENACOVA
✉ Rua do Miradouro, 12
PT-2735-300 CACÉM (SNT)

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

U.E.A.: (vakas)
ILEI: João SANTOS (deleg.)
E.E.U.: Faria de BASTOS
TEJO: Ricardo TOSCANO (A-kom.)
ILERA: Francisco MELO (CT1CGE)
EJA: Faria de BASTOS
SAT: Pedrosa ALVES (kotiĉzj.)
IKEK: Alcino ALVES
IKUE: Salette dos SANTOS
SEL: (vakas)

MOVADO:

Oporte studcele, franco instruos komencantojn*

De la 22 de Februaro ĝis la fino de Julio estas en urbo Oporto nova aktivo, Fabien Tschudy, 22-jara franco antaŭe loĝanta en Strasburgo. Studanta la kvaran universitatan jaron pri Bioteknologio, Fabien staĝas en Instituto pri Embriologio kaj Histologio (Hospitalo S. João), en laboratorio kie oni esploras pri kronika doloro. Esperantisto de antaŭ du jaroj kaj duono, li membras en Junularo

Esperantista Franca Organizo kaj en pluraj grupoj, kaj aliĝis ankaŭ al P.E.A. Li estas flua parolanto, tre movadema, kaj pretas instrui al novuloj kaj disvastigi esperanton nialande. Tre taŭge alvenis li nun, ĝuste kiam Nogeso (Norda Grupo de Esperanto-Studado) kaj PLUS (la nordokcidenta sekcio de P.E.A.) bezonis vigligon!

AGP

(*) legu intervjuon kaj kursdetalojn en <http://www.esperanto.web.pt/fab.html>.



Foto: Fabien kun aliaj esperanto-klubanoj dum buddeĵoro en Strasburgo.



Supre: Alcino kaj ges-roj Almeida dum kontrolo. **Malsupre:** Ekkunveno. **Kovrile:** Hugo kaj Boieiro, du novaj estraranoj.



Vigla kaj profitdona diskutado okazis dum la lasta Ĝenerala Asembleo de PEA, la 19-an de Marto 2005.

Kompetente estris ĝin la prezidanto, José Manuel Gaspar MARTINS, helpata de la sekretario, Werther SACRAMENTO. Partoprenis 19 asocioj, el kiuj estas notinda la ĉeesto de la plej juna membro de la Asocio, Marta TUVÁLKINA. (Tiun nombron ni superis lastfoje nur en 1993, kaj apenaŭ ne en 1996; vd. ankaŭ NB63:6.)

Plenuminte la kutimajn formalajn oni eniris la diskutadon de kelkaj aspektoj malpli klaraj de la prezentitaj estraraporto kaj kontoj koncernantaj al la antaŭa jaro. La plej vive diskutitaj detaloj rilatis al la kontoj, kiuj estis rapide kaj kontentige klarigitaj de samideano António da Silva ALMEIDA.

► Por tiu intereso-plena analizado multe kontribuis la partopreno de la estonta kasisto, Miguel BOIEIRO, kiu rivelis profesiajn konojn de tiu areo.

Teda areo, tamen nepre por bona funkciado de iu ajn Asocio. Estis diskutate ankaŭ pri aliaj enspezo-fontoj (krom la membro-kotizoj) kaj oni menciis la gravecon okupiĝi sisteme pri suvenecioj; s-ano Kasesa promesis esplori pri D.L.124/96 (vd. NB88). Oni konkludis ke la financa situacio, kvankam ne brila, garantias antaŭeniron de P.E.A. en la proksima estonteco.

Sekvis balotado por novaj organoj, kiu gvidos la Asocion dum du jaroj. Post prezentado de la kandidataro "A" (la sola), oni elektis ĝin (vd. pĝ. 2 kaj NB86:4).

Kiel lasta punkto de la tagordo oni diskutis proponon de la estraro por aktualigo de la kotizoj (vd. NB86:6-7). Ĉi-kampe, António MARTINS-Tuválkin prezentis bone ellaboritan statistikan studon pri la evoluado de kotizoj dum la lastaj jaroj kaj sugestis ke, estonte, oni apliku sistemon de aŭtomata aktualigo, surbaze de la oficiala inflacio en Portugalio. La prezentita regularo estis aprobita kun jenaj ŝanĝoj: En §4 nova teksto de la komenco: «Oni ĉiam konservu»...; en §5 forigo de la noto.

Estas rimarkinde ke, malgraŭ vigla kaj longa diskutado de la diversaj tagorderoj, ĉiuj proponoj ricevis unuanimecon je ilia aprobo. Ĉi tiu unueco povus signifi, unuavide, mankon de novaj kaj freŝaj ideoj, tamen, ĉi-kaze, unuanimeco post diskuto montras kapablon dialogi kaj kompromisi, klaran konscion pri la problemoj de la Asocio kaj volon por pace ilin solvi. ■

LINGVO-POLITIKO:

Nenian debaton sen traduko!

Hispanio, Italio kaj Portugalio malebligas debaton en la Eŭropa Unio pro manko de tradukistoj.

Hispanio, Italio kaj Portugalio malebligis la okazigon de renkontiĝo de la ministroj pri laboro de la Eŭropa Unio, kiu devis okazi la 3-an de marto 2005, ĉar la dokumentoj de unu el la aferoj traktendaj nur aperis en la franca, angla kaj germana lingvoj. Laŭ la reglamento de la interna funkciado de la Konsilio nepras ke ĉiuj dokumentoj estu tradukitaj en ĉiujn oficialajn lingvojn de la Eŭropa Unio.

La batalo de la lingvoj en la Eŭropa Unio akriĝis lastatempe ĉar la Eŭropa Unia Komitato deziras limigi la tradukeblecojn en la Eŭropa Unio, tiel ke ĉiuj dokumentoj nur estos tradukitaj en la germanan, en la francan kaj en la anglan lingvojn. Ĝis la pasinta monato novembro la paroladoj de la komitatanoj estis tradukitaj en ĉiujn oficialajn lingvojn de la Eŭropa Unio, 11 lingvoj kiam aniĝis 14 ŝtatoj kaj 20 lingvoj hodiaŭ kun 25 ŝtatoj. Hodiaŭ, la tradukado en ĉiujn lingvojn de la Unio estas garantiita en la merkredaj renkontiĝoj de ĉiuj membroj de la Komitato. La ceteraj tagoj nur aperas tradukoj en la lingvoj germana, franca kaj angla.

Do, oni komencas paroli pri "trilingvismo" en la Eŭropa Unio. Ĉi tiun situacion kritikis ĉefe la reprezentantoj de Italio, Hispanio kaj Portugalio.

*José María RODRÍGUEZ Hernández
(Esperanta Jura Asocio)*

LINGVO:

Plu pri casquinha

Kun intereso mi legis la artikolon "Kiel traduki la vorton "casquinha"?", verkitan de s-ano Gonçalo NEVES (NB82:8-9). Pro ĝi mi serĉis en miaj vortaroj kaj trovis la jenon (mia traduko):

Dicionário Universal da Língua Portuguesa (2-a eld., 1653 p, 1997, Porto Editora): «Maldikega tavolo el oro aŭ arĝento, kiu plakas objektojn el vulgara metalo. Kava konuso el kukoblato por enhavi glaciaĵon.»

Enciclopédia Diário de Notícias (sen dato, vol. 1): «Ligno el Flandra pino (*Pinus sylvestris*). Maldikega tavolo el nobla metalo por plaki objekton el ordinara metalo.»

Dicionário Enciclopédico Koogan Larousse Selecções (*Selecções do Reader's Digest*, 1997, vol. 1): «Maldikega folio el oro aŭ arĝento kiu plakas malgrandvaloran metalon.»

Michaelis - Moderno Dicionário da Língua Portuguesa (2260 p, 1998, Companhia Melhoramentos de São Paulo, Brazilo): «Ligno el Flandra pino (*Pinus sylvestris*). Maldika tavolo el fajna ligno, kiu plakas objekton el vulgara ligno. Maldikega tavolo el nobla metalo por plaki alian metalon. Malgranda fiŝkapta boato uzata en Delgada Kabo »(*Cabo Delgado*, Mozambiko)«. Dolĉaĵo el ŝelo de cedrato (*Citrus medica bajoura*). (Bras.) Konusa ujo el kukoblato por glaciaĵo.

En ĉiuj cititaj verkoj aperas la informo, ke temas ankaŭ pri maldika ŝelo el io ajn. Dank' al la ĉi-supraj indikoj oni konstatas, ke ankaŭ brazilanoj uzas la vorton "casquinha" kaj jen respondo al s-ano G.N. **A. S. Almeida**

MOVADO:

Nia juna diasporo

Portugaloj en "Portugal-uj-o", ĉu ne?... Ĉiu en sia ujo, kaj jen la mondo — ujaro. Ĉu ne?... — Nu, fakte ne. La Homo estas besto migrema kaj ĉiam iuj pretas forlasi, eĉ se revenonte, sian hejman "ujon". Krome direblas ke estas portugala emo «ankoraŭ plian kabon turni».

Tia estas nia membraro: nur 178, sed el tiuj naŭ* estas elmigrintoj, portugaloj kiuj loĝas alilande, kaj pliaj tri iam estis. Temas plejparte pri junaj studentoj kaj ekkarierintoj, kaj ilia elekto varias: Usono, Germanio, Angolo, Italio, Nederlando, Belgio, Svedio, Brazilo, Rusio, Britio, Hispanio.

El tiuj elmigrintoj, pluraj aktivas movade en siaj adoptlandoj, kvankam nur unu lernis esperanton ekster Portugalio: Eblas diri do ke nia landa movado iel "eksportas" esperantistojn!

Aldone menciindas pluraj ne-portugaloj kiuj loĝis aŭ loĝas nialande (ambaŭe oko da tiuj) kaj tial P.E.A.-aniĝis. Kelkaj el tiuj estas aŭ iĝis konataj movadanoj (vd. ekz. pĝ. 3 aŭ NB85:8). En tiu nombro estas almenaŭ unu kazo pri lernado de esperanto en Portugalio mem, fortigante do nian rolon kiel movada "eksportisto".

(Ĉitekste ni evitis "nomi nomojn" pro respekto al onia privateco, sed *Nia Bulteno* volonte publikigos raportojn kaj impresojn pri «Mi, iama portugaliano, movadumas!».) **AMT**

(*) Tiu nombro ne koincidas kun la oficiala membrarstatistiko, kiu montras **nur ok** eksterlandajn membradresojn, pro tio ke **1.** ĉe iuj membroj la portugaliaj familiaj a.s. plu ricevas kaj plusendas poŝtaĵojn, kaj ke **2.** P.E.A. havas kelkajn neportugalajn membrojn loĝantajn eksterlande.)



Okazis en *Mataró* (30 km norde de Barcelono) la unuan semajnfino de marto (2005.03.04-06) renkontiĝo organizita de KEJ/KEA. I.a. ĝia organizantaro celis kunigi lernantojn kaj veteranojn per kaj de la konata kataluna etoso kaj ĝi estis anoncita kiel aranĝo por la komencantoj. Laŭtende ĝin ĉeestus ĉirkaŭ 30 katalunoj sed fakto estis ke partoprenintoj venis ne nur el pluraj partoj de Katalunio sed ankaŭ de aliaj regionoj de Hispanio kaj Francio, el Portugalio (6!), Italio, Andoro, Germanio kaj Ĉinio. Eblis do ĝui agrablan etoson dum 3 tagoj kaj al tio kontribuis sufiĉe plaĉa vetero: Ne pluvis.

Pro tio ke la partoprenintoj estis pli da ol atendate (kelkaj eĉ devis tranokti ĉe lokaj esperantistoj) la gastejon plene okupis (nov)esperantistoj. Tiakunvene homoj ĉiam havas malsamajn noktumemojn, do la amasdormoj oni tre saĝe aranĝis: Estis ĉambro por trankvilulo en la plej supra kaj silenta etaĝo, kaj tri aliaj, rangigitaj laŭ diversaj gradoj da "noktemuleco". La manĝejon oni

uzis vice pro spacmanko, aliaj salonoj gastigis diversajn samtempajn programerojn. Gufuje oni spektis filmojn, manĝeje oni ĉeestis prelegojn kaj debatojn. La fleksebleco de la organizantoj evidentiĝis tuj en la unua nokto kiam unu el la salonoj perdis la plafonon dum instruado pri la kataluna kulturo: Neniu vundiĝis sed kelkaj koleriĝis.

Rimedo tre ŝatata de lernantoj (kaj ne nur) estis du dubo-solvulaj sesioj, gvidataj de António MARTINS kaj de Hèctor ALÒS, por klarigi la plej diversajn dubojn pri gramatiko. Instruata de Bruno REIS kaj gvidata de Ferriol MACIP okazis ankaŭ kurso por komencantoj kiu ilin pozitive impresigis kaj dum kiu oni mirakle eĉ ne krokodilis.

Dimanĉe eblis paŝi transurbe al romiaj restaĵoj kie oni, per gvidata vizitumado, iom lernis pri la tiama kulturo. Estis ankaŭ promenado urbocentren; kelkaj perditis sed post du-plada ripozo facile trafis la gastejon. Ripetante la I.S.-an sukceson, Gabrielle CORSETTI prelegis pri sia plurmonata restado en ▶



Prelego de Manuel de SEABRA; apude Llibert PUIG. Dumpromena ripozado al ŝoseo romia.

► Ĉinio kiel instruisto de la angla lingvo kaj kia estis sperto loĝi ene de azia kulturo. Verkisto Manuel de SEABRA (portugalo longe loĝanta en Barcelono) prelegis kaj akceptis membrigilon donitan de P.EA. Estis ankaŭ sesio pri C.N.T., loke kaj movade historie grava.

Profitante la ĉeestadon de agemaj esperantistoj el pluraj lokoj de la ibera duoninsulo oni eĉ pli vigle starigis movadan kunvenon. Inter KEA-a anonco okazigi tian renkontiĝon kvar fojojn jare kaj kutima emo starigi iun vere iberan (t.e. ambaŭ ŝtatoj) aranĝon, oni sciigis ankaŭ pri ĵus aperinta movademando andaluzie kaj projekto arigi plurajn ilojn interrete por ke la plej movademaj kerne organiziĝu.

La Sekva KEA-a aranĝo okazos en *Vilafranca de Conflent*, en Franciata Katalunio (2005.05.07-08). ■



Hèctor kaj Marta debatas.

ARANĜOJ:

Inter dancejo kaj gufujo*

Internacia Seminario, la mita I.S., estas organizata jarŝanĝe de Germana Esperanto-Junularo. Post sep jaroj sen portugaloj, jen en 2004/05 ĉeestis Xana kaj Rut'.

Kion diri pli pri I.S.? Ĝi estas junulara renkontiĝo kies dato, la jarŝanĝa semajno, ebligas al junaj esperantistoj eniri novan jaron... internacie. Ĉi fojo (2004.12.27-2005.01.03), estis jam la 48-a, do oni povas diri ke temas ja pri tradicia evento kiu (eĉ kun tio ke Germanio ne estas la plej komforta lando por loĝi dum vintro!) logas multajn homojn — ĝian tradiciecon montras la kvanto da etaj ritoj, kutimoj kaj "veteranaj partoprenantoj".

Por mi estis fajropruvo pri esperanto kaj pri mia kapablo ĝin paroli — verŝajne sukcese trapasita ĉar mi entute ne havis tie problemojn komuniki (krom kun neesperantistoj, pro mia ne ekzistanta kono pri la germana lingvo).

Wetzlar estas malgranda urbeto, kiu situas norde de Frankfurto kaj sude de *Marburg*. La temo de ĉi lasta I.S. estis «Kultu-

raj diversoj — problemoj kaj perspektivoj» kaj oni ja povas diri ke kaj la programo kaj la kunestado ĝin speguligis.

En sufiĉe granda junulargastejo, rezervita nur por la aranĝo, la ĉeestantoj povis lerni kaj babili en esperanto pri la plej diversaj aferoj (sen eliri nia loĝejo ni povis ekzemple lerni la lingvon *Toki Pona*, aĉeti librojn, drinkumi kaj danci!) kaj pro tio ke la frosta vetero iom timigis eĉ la plej kuraĝajn kunvivado estis konstanta (eĉ foje troa — I.S. tute ne estas konsilinda evento por klaŭstrofobiaj homoj!).

La loĝejo estis sufiĉe proksimaj paŝi al *Wetzlar* estis por mi la nura momento de ne-esperantumado. Do oni povas diri ke mia partopreno funkciis kiel intensiva kurso (revene al Oporto mi distre alparolis esperante plurfoje miajn neesperantistajn familianojn) krom kiel ferio. Nepre ja utila sperto. *Xana*

* vd. NB85:3 kaj NB80:16-17.

INTERVJUO:

«afabla & interesa» «dolça & bonega»

IVO MEISER



NB: *IS famas — laŭ iuj eĉ fifamas. Ĉu konfirmiĝis?*

Rut’: «Mi tute konfirmas! Sed ne vere fias — mi havis bonegan tempon tie. Sed eble ĉar estas organizata de germanoj ĉio estas tre strikta (horaroj, etoso, k.t.p.). Mi ege ŝatis I.S.n — eble ne la aranĝon mem (tro “doma”), sed revidi bonegajn junajn esperantistojn kaj ekkoni novajn ege indis. Mi sentis min mem hejme idee, dance, krede.»

NB: *Ĉu prelegojn aŭ festadon? Aŭ ĉu ambaŭ?*

Rut’: «Ĉifoje mi preskaŭ ne iris al la prelegoj. Sed ili ekzistis. Unu el la problemoj estas ke la festo nur vere bonas tre malfrue kaj poste oni ne povas ellitiĝi frue...»

Xana: «La famo konfirmiĝis, IS ja ŝajnas iom aparta evento (kvankam mi antaŭe nur partoprenis lokajn aranĝojn kaj do ne tro povas kompari), eble ĝi ankaŭ famas pro tio ke okazas en oportuna epoko por junuloj, estas eĉ etaj tradicioj, kvazaŭ ritoj kaj ekzistas multaj regulaj partoprenantoj (kelkaj homoj antaŭe partoprenis plurfoje kaj ĉiam revenas), veteranoj de I.S. La fifamo ne konfirmiĝis sed... nu, Germanio vintre estas tre malvarma kaj dum la seminario homoj pasigas multan tempon kune kaj en sufiĉe malgranda loko (oni estas preskaŭ la tutan tempon gasteje kie ankaŭ okazas la eventoj), do mi supozas ke eble tial aperas fifamo. Multaj homoj en la sama loko babilante konstante nature komencas klaĉi. IS ŝajnis al mi iomete kiel renkontiĝoj de adoleskantoj je tio.»

Xana: «Kvankam mi ne tro partoprenis la programon (ĉefe ĉar mi pigris kaj ĉiam malfrue vekigiĝis) eblas kaj festumi kaj ĉeesti prelegojn en IS, la temoj kaj aktivajoj estas vere pluraj kaj diversaj.»

NB: *Jam longe ne iris portugaloj al IS; al Wetzlar iris du. Kiel tio influis vian partoprenon?*

Rut’: «Mi ne sentas min speciale portugala, do mi ne sentas pli bone ĉar estis alia portugalo. Sed ĉifoje la alia portugalo estis tre dolça kaj bonega kaj festema homo — kaj tio gravas! Ankaŭe, estis bone ke Xana tie estis ĉar mi ne bezonis esti oficiala portugalo (por TEJO: mi ne scias se ŝi partoprenis en la agado, sed ne estas senco por mi tion fari, ĉar mi ne loĝas aŭ loĝos en Portugalio).»

Xana: «Ne influis fakte, kvankam la organizantoj de IS tion menciis reage al mia aliĝo.»



CHARA FORTINARO

MOVADO:

Pasporta Servo 2005: 5 adresoj en Portugalio

Jam aperis la 2005-a eldono de *Pasporta Servo*, gvidilo pri senpaga gastigado tutmonde por esperantistoj. En ĝi enlistas kvin portugaliaj adresoj: en mun. *Alcochete*, *Barreiro*, *Porto*, *Sintra* kaj *Torres Vedras* (estas geografiaj strangajoj ĉiprie en la libro!); plus P.E.A. kiel kunordiganto. Tio estas certe pli ol en pasinta jaro (2+1 adresojn), sed ankoraŭ malpli ol tre facile eblus: Ekzistas almenaŭ tri esperantistaj hejmoj kiuj kutime gastigas es-

perantistojn (ne nur siajn amikojn) sed kiuj mankas en *Pasporta Servo 2005* (*). Estas grave tion ŝanĝi: Kvankam tiuj (kaj tiaj) hejmoj estas konataj al P.E.A. kaj do ĝi povas (kiel kunordiganto) ilin utiligi favore al gastigserĉantoj, ni ne forgesu pri la "propaganda" valoro (en- kaj ekster-movada) de *Pasporta Servo*: Estas pli bone prezenti ok adresojn en Portugalio, ol nur kvin. AMT

(*) "Maŭrkastela Muelejo", "Volbeto" kaj "Sudorienta Pakistano".

► NB: Kion vi povas diri pri la alia portugala partopreninto?

Rut': (Krom tio dirita en la antaŭa respondo,) «Nunomankis» (NB84: 8)«. Eble venontan kongreson ni estos (almenaŭ) tri! Mi certe iros al I.J.K. en *Zakopane*.»

NB: Kion vi mesaĝus al portugala partoprenantoj de IS'2005-2006?

Rut': «Indas iri: Ne maltrafu la koncertojn kaj ne drinku tro!»

Xana: «Nu, Rut ŝajnas afabla kaj interesa, sed ni ne konis unu la alian antaŭe kaj ne multe konatiĝis dum I.S. do mi ne povas multon diri. Espere ni revidiĝos en aliaj renkontiĝoj!»


Xana: «Mi pli avertus ol mesaĝus: Portu varmajn vestojn kaj provu iom eliri la gastejon! Esti tro da tempo en la sama loko ne estas sanige por la menso!» intervjuis AMT

Fote: Rut' dancas. Xana kun madrida amiko José "Akvo".

ARANĜOJ:

Kie RPE21?

Mape: Jamaj R.P.E.-oj, eks-terlisbonaj Zamenhoffestoj, kaj Atlantikaj Plonĝadoj, kun jarindiko (nenion insule).



Post la entuziasmo vekita de la relative sukcesa 20-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj en *Tábua* (vd. NB85:6) restis kompromiso nepre plu organizi sekvan jam en 2005. Estis iom nekonkreta plano okazigi ĝin ie ĉe la avejra laguno (kun *Ílhavo* aŭ Avejro mem kiel gastiganta municipo), sed tio dume ne konkretiĝis kaj nenio estas jam fiksita pri R.P.E. 2005. Proponoj el organizemaj lokanaroj (ekz. tiuj menciitaj en NB85:2) atendatas! AMT

HOMOJ:

Edziniĝis la “princino”

Pli ol unu el la jam dek portugaliaj esperantlingvaj infanoj same miskomprenis: Kiu estas tiu belega knabino, filino de nia estrarprezidanto?... Ĉu ne temas ja pri princino Silvja, el la lingvinstrua bildfilmo *Mazi en Gondolando...*? Jen lastaŭguste geedziĝis Sílvia Faria de Bastos (dume iĝinta mem infanpsikologo), sen bezono pri «kuraĝa forkuro»: Male, la patra ligo estis tre originale markita okaze de la nuptfesto, per invituloj portugalkaj esperantlingvaj. Tion fari kun sugestis la novedzo, komput. inĝ. Rui RAMOS, kiel bofilan omaĝon, kaj la tradukon plenumis João SANTOS, esperantista amiko. Sílvia mem atestas: «Kvankam ne mi parolas esperanton, mi komprenas ĝin kaj ĉeestis plurajn renkontiĝojn. Kelkaj eksterlandaj esperantistoj ĉeestis la geedziĝfeston kaj por tiuj la dulingvaj invitiloj estis ne nur simbolaj.» Ŝi naskos infanon junie, jen eble plia denaskulo nialande. **AMT**



Pena Dias

LITERATURO:

Neĝoj neĝeje

Lesbók, la plej granda islanda ĵurnalo, **publikigis** (pĝ. 6, 2004.03.13, kultura sup.) la **poemon** “*Skáldvera*” (“Poeteco”), verkita de **Gonçalo NEVES**

kaj tradukita de BalduR RAGNARSSON, konata islanda kaj esperanta poeto. Temas pri unu el la 38 poemoj aperintaj en la libro *Simptomoj*, kiujn Gonçalo verkis inter 1991 kaj 1999 (FEL, 1999, 72 pĝ., ISBN: 90-71205-86-X). **GN**

LITERATURO:

Libra livero

Konstatante ke ne ekzistas esperantaj verkoj en la katalogo de la Nacia Biblioteko de Portugalio, Kultura Kooperativo de Esperantistoj (✉ Av. 13 de Maio, 47-54. 208; BR-20031-007 RIO DE JANEIRO RJ; 🌐 <http://www.kke.org.br/>) sendis pakaĵon kun libroj en/pri esperanto kadre de la Kampanjo «Esperanto en la Bibliotekojn». Estis senditaj:

- *La Luzidoj* (Camões)


- *O Desafio das Línguas* (Claude PIRON)
- *Doutor Esperanto* (Walter FRANCINI)
- *Esperanto para Principiantes* (A. SARTORATO)
- *Vocabulário Esperanto / Português / Esperanto* (Carlos DOMINGUES)
- *Iracema* (J. ALENCAR)
- *La Rompitaj Flugiloj* (Kalil ĜIBRAN)

K.K.E. jam sendis pli ol 300 librojn al 23 brazilaj kaj 7 alilandaj bibliotekoj kaj daŭre akceptas donacojn por subteni la kampanjon. **A. SARTORATO**

HOMOJ:

Jen forpasis la versama “ĉapelsinjoro”

Mi ekkonis **António Serafim DIAS** dum mia 1-a esperanto-aranĝo (*Caldas da Rainha*, Zamenhoffesto de 1988). Mi gardas memoron, el tiu kaj el postaj fojoj, pri malkruda kaj interesa karaktero: Ĉiam tre eleganta, fajntrajte aplomba eĉ se modesta, li apenaŭ iam



■ A. MARTINS-Tuválkin

Carreira TAPADINHAS: «Li estis entuziasma kaj talenta deklamisto. Mallonge en la oficiala instruado, li klerigis sin mem, iĝinte atenta kaj klarvida mondrigardanto.»

En 2002, iel ekloĝinte en *Bobadela* (mun. *Sacavém*), mi serĉis la asocian

laŭtigis sian voĉon — tamen ĉe li bruloj ekkvietis kaj aŭskultis: Tiam ofte ion spritan el la popola poezio, speciale el António ALEIXO... Eterna ĉapelo sinjoreca, maldikaj cigaroj, roversa dianto, rideto afabla sed malnaiva — li mem verkis pri si: «*Se eu »te« pareço um burguês ¶ é porque tu não vês ¶ a força do meu ideal*» («Se »al vi« mi aspektas burĝo, vi ja ne konas la forton de mia idealo»)

Korkistiĝinte ankoraŭ infanaĝe, li loĝis laŭ la peloj de tiu fako, forlasinte *São Marcos da Serra*, kie li naskiĝis en 1920. En 1993 neatendita militserva monkompenso permesis al li memeldonon de poemlibro, kien li kunigis diversajn disajn verkaĵojn (portugallingvajn): *Poemas de António Serafim Dias*, 70 pĝ. (vd. *NB64:22*). Li tie rakontas:

«Mi ĉeestis esperanto-kurson en *Alhos Vedros* en 1936 sed post tri monatoj iĝis malpermesite instrui! Dudekjara mi militservis en Acoroj kaj tie plu lernetis per mendita libro. Reveninte al la civila vivo, mi finlernis per koresponda kurso. Baldaŭ mi ekinstruis.» Samlibre gastkonkludas lia amiko esperantisto J.

sliparon kaj jen trovis Serafim DIAS, plu adresata en la loka “korkista kvartalo” (*Bairro Tavares, Empresa Nacional de Cortiça*), inter fervojo kaj rivero.

Iam pitoreska kaj ĉarma, kiel mi konstatis dum finfina vizito, jen tiu domotaro estas nun sufokita de la baŭmanta kaj tondranta kolonarpono de ŝoseo IC2. Same kadukiĝinta estis António Serafim DIAS, je mia granda konsterno. Multo de li memorigis pri la iamo, sed la destino estis al li senkompata: Sen familio (du gefiloj de eksedzino eksterlande), perdinte multon el sia mensa kaj korpa viglo, li apenaŭ pli ol travivis en vere mizeraj kondiĉoj. Aplombe li rifuzis la komunuman socialan helpon kaj nur la najbararo kaj maloftaj amikoj lin iel prizorgis. Mi revenis kelkajn fojojn por livero de *Nia Bulteno* kaj por iom da esperanta babilo, sed ne tiom ofte kaj longe kiom ni ŝatus.

En P.E.A. ni eksciis pri forpaso per retrosendo de poŝtaĵo, komence de 2005; laŭ najbaro ĝi okazis fine de 2003 aŭ frue en 2004. Restas la memoro pri malnaiva, popolama, fajna sinjoro. ■

21-a feb.: tiel pasis la Tago de Gepatraj Lingvoj 2005



Dirk BINKMANN



La **21-an de februaro 2005** *Unesco* ree festis la **tagon de la gepatra lingvo**. Kiel jam en 2003 kaj 2004, U.E.A. aliĝis al tiu evento per deklaro pri la rolo de **esperanto** ankaŭ kiel protektilo de la **lingva diverseco**; aldone aperis plurlingvaj afiŝoj, el kiuj ni prezentas kvar. Ĉiujn afiŝojn en <http://www.uea.org/> (Ĉu vi povas **diventi parkere** kiujn lingvojn ĉisupre? Sendu vian supozon al NBB)

REMETENTE:

Associação Portuguesa de Esperanto
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio
annumero

últ. quota paga
lasta kotizpago

foto
foto

laste ricevita
interŝanĝnumero